Theodor Fontane,

# Printempo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Finfine tamen venis ĝi
Kun verda burĝonar',
Parolas la arboj inter si:
"Ĝi venis ja en ĉiu jar'."[2]

Nun forte ili burĝonas jen,
Jam longe atendis ĝin;
La olda pomarbo en la ĝarden'
Obstinas, sed devas je l' fin'.

Hezitas la maljuna kor',
Ankoraŭ timas kaj
Ja scias: „Mart' ne estas for,
Kaj Mart' ne estas Maj'."

Ho skuu la pezan sonĝon for,
Samkiel tiu pomarbo ĉi:
Vekiĝu fine, mia kor',
Kuraĝu ankaŭ vi.

*Traduko de la Germana poemo "Frühling" de* Theodor Fontane *(Teodoro Fontano, ∗1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-302-611 (2005-03-25 15:58:08)*

[2] aŭ: "Ĝi venis en ĉiu jar'."